

FRANCA

PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns	76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 TERRASSE Rue du 11 novembre	59290 WASQUEHAL
Asistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie	49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon	59800 LILLE
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE 12, r. Estienne d'Orves	54490 PIENNES

C.C.P.: Association Catholique Française pour l'Espéranto 2 324 93 N ROUEN.

==== la n°: 8 F. Abono: 30 F (TTC). Kotizo: 10 F. Sumo: 40 F. ====

+++++

==== N° 183 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== DECEMBRO 1994 ====

+++++

LE MOT DU PRESIDENT

=====

La Bible fut le premier livre traduit en Esperanto par Zamenhof, créateur de notre langue. Nous possédons tous, ou presque, une bible en Esperanto et nous sommes heureux de pouvoir lire le texte sacré dans la Langue Internationale.

On ne saurait nier que la Bible soit de nos jours un texte trop souvent méconnu du grand public et même d' un grand nombre de catholiques. C' est pourquoi il me paraît utile de faire connaître que l' Université de Nanterre offre à ses étudiants un cours de lecture de la Bible, présentée comme mémoire culturelle et fonds commun de culture mondiales.

Ce cours a un grand succès auprès d' étudiants qui pour la plupart sont agnostiques et découvrent avec surprise, mais aussi intérêt, le texte inspiré et constatent alors combien leur connaissance des thèmes bibliques était erronée et incomplète.

Cette présentation de la Bible à un public en majorité non-croyant ne peut que nous réjouir et nous faire prendre conscience de l' intérêt que l' homme d' aujourd' hui porte parfois inconsciemment au sacré et au divin.

Les espérantistes catholiques que nous sommes ne peuvent qu' être encouragés et fortifiés dans leurs efforts pour faire connaître leur Foi et inciter leurs amis et correspondants non-chrétiens à lire les textes bibliques. Eux-mêmes trouveront profit à lire et méditer la parole de Dieu pour y trouver la force de porter témoignage de leur Foi dans le milieu espérantiste.

A vous tous bonne et heureuse année 1995.

A.B.

LA BILETO DE LA PREZIDANTO

=====

La Biblio estis la unua libro tradukita esperanten de Zamenhof, iniciatinto de nia lingvo. Ni ĉiuj, aŭ preskaŭ ĉiuj, posedas Esperanto-biblion kaj ĝojas legi la sanktan tekston en la Internacia Lingvo.

../...

PRI LA KORANO (daŭrigo)

LA ELDONAĴOJ KAJ LA NUMERIGO DE LA VERSIKLOJ

Hodiaŭ la plej disvastigata eldono en araba kampo estas tiu presita la unuan fojon en Kairo (Egiptio) en 1929. La teksto estas kopiita de unu el la sep legaĵoj, tiu de Hafç, kiu de tiam emas anstataŭi la aliajn kaj fariĝi la vulgato. Bedaŭrinde la numerado de la versikloj ne tute estas la sama en ĉiuj tradukoj de la Korano. La malmmodernaj orientalistoj sekvis la numerigadon de la eldono donita de unu el ili, Flugel; pli kaj pli la modernaj uzas tiun de la eldono de Kairo.

Por la muzulmanoj la Korano ĝuas privilegion unikan inter la aliaj libroj. Laŭ ili la Biblio kaj la Evangelioj estus manuzitaj tiagrade, ke ili lasas ŝvebi dubon pri la valoro de la versikloj; la Korano, diras ili, havas tekston ŝirmatan kaj protektatan de Dio. Sola, la Korano estas aŭtoritataĵo (v. suraon 15, 9).

La Korano konsistas el 114 ĉapitroj nomataj suraĵoj (arabe: sura; france: sourate); ili estas de neegalaj longecoj. La unua suraĵo estas mallonga preĝo, fundamenta preĝo de Islamo, kiun oni nomas fàtiha, t.e. la malfermo. Poste la suraĵoj estas ordigitaj proksimume laŭ malpliĝa longo. La tuta Korano respondas proksimume je du trionoj de la Nova Testamento.

JESUO KAJ MARIA EN LA KORANO

La Korano parolas pri Jesuo kaj Maria, lia patrino, kun granda respekto. Ĝi insistas pri lia fila pieco por sia patrino, pri liaj mirakloj, pri lia boneco, kiun li metis en la koron de siaj disĉiploj. Li estas ekzemplo por la izraelaj infanoj (v. suraon 43, 59). Pri la infaneco de Maria, la Korano alprenas la tendencon de la praevangelio de Jakobo. Antaŭ la naskiĝo de Maria, ŝia patrino, kiu atendas ŝin, dediĉas al Dio, kion ŝi portas en si, kaj poste ŝi metas sian filinon kaj la idaron, kiun ĉi tiu naskos, sub la protekton de Dio kontraŭ Satano la ŝtonumita (1)(v. suraon 3, 31). La infanaĝo de Maria disvolviĝas en la "sanktejo" (senprecize), kie la maljunulo Zafario zorgas pri ŝi kaj trovas ŝin ĉiam provizitan per nutraĵo.

(1) Estas la epiteto konstante donita al Satano, ĉar, diras la tradicio, iam Abrahamo atakis per ŝtonĵetaĵoj la diablon, kiu volis tenti lin.

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO

Ĝi okazis en Paris la 19-an de oktobro 1994, en ĉeesto de: F-to Marmou, S-ino Vincent, F-ino Preux, S-roj Bessière, Despiney, Lafargue kaj Pons.

Petis senkulpigon: P-roj Bourdon kaj Héroux, S-ro Colas.

Konstatinte la sukceson de la kongreso en Moulins-lès-Metz, la komitato preparis la programon de la venonta en Limoges. (v. aparte). Temo: Ĉu kristanoj kaj islamanoj povas kunlabori al la paco?

Kvar komitatanoj finos sian mandaton en 1995. Tri el ili jam rekandidatiĝis: F-to Marmou, S-roj Pons kaj Villeneuve. S-ro Collet anoncis sin por anstataŭi P-ron Degrelle, kiu ne deziras rekandidatiĝi. Al tiu lasta, la komitato esprimas sian dankon pro la sindona laboro farita favore al nia asocio kaj al la Esperanto-afero entute.

La prezidanto informiĝos por scii, ĉu la tutlanda kongreso okazos en 1996, kiel anoncite.

Kune kun la franca KELI-sekcio, nia asocio klopodos organizi ekumenan diservon okaze de la Eŭropa kongreso en Parizo en la Pentekosto 1995.

La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la 25-an de januaro 1995.

MORTIS PASTRO ESPERANTO

P-ro Ciccanti, konata kiel "P-ro Esperanto", forpasis la 13-an de septembro 1994 post sia reveno el la kongreso en Armeno. Li mortis dum sia dormo, kaj liaj kunmonaĵoj trovis lin senviva en la mateno.

Ĉiam ridema kaj ĝoja, P-ro Ciccanti tre aktivis en la esperanto-movado. Li multe vojaĝis kaj kongresis en la tuta mondo. Li ripozu en la paco de Dio.

LA KRISTANA ORIENTO (daŭrigo)

La partopreno de Johano en tiu Jerusalema apostola "konferenco" povas montri, ke la Apostolo estis tiam sensarĝita je la misio, kiun konfidis al li Jesuo koncerne la Virgulinon Maria, kaj li povis esti tia, verŝajne, nur pro ŝia morto. Oni rajtas opinii, ke Johano ne trudis al la Virgulino la riskojn, senutilajn al ŝi, de la longa kaj laciga vojaĝo ire kaj revene de Efezo al Jerusalemo.

En tiu tempo, la Virgulino estis ĉirkaŭ 60-jara, vivdaŭro, kiun fiksas al ŝi la tradicio. Fiksi la daton de ~~xx~~ ŝia Ĉieliro ĉirkaŭ 46 aspektas sufiĉe saĝe.

Sajnas ne tre verŝajne, ke la Virgulino vivis en la jaroj 53-56, dum kiuj Paŭlo restadis en Efezo. Kiel la Apostolo, en kies leteroj svarmas la detaloj, povus ne aludi je la ĉeesto de Maria, kiun li certe estus vizitinta?

Post la ekzameno de tiuj atestoj, kongruaj kaj fidindaj, celanta je tio, ke la Sankta Virgulino tre verŝajne finis sian teran vivon en Efezo, apud Sankta Johano, oni povus kredi, ke nia enketo finiĝis. Sed nova fakto aldoniĝis al la dosiero en la unua kvarono de la XIX-a jc. kaj plej neatendite ĝin prilumis.

Juna stigmatizita germanino, restadante en la monaĥinejo de Dŭlmen, proksime al Dŭsseldorf, Katerina Emmerich (1774-1824), ricevis revelaciojn, i.a. pri gravaj detaloj koncerne la Pasionon de Kristo kaj la vivon de l' Virgulino post ŝia Ĉieliro. La Eklezio, kies unua reflekso estas la singardo, eĉ la malfido rilate al la viziuloj, ne antaŭvertis la fidelulojn kontraŭ la revelacioj de K. Emmerich. La loka Eklezio (Smirno, nun Izmir) atentis pri tio zorgante pri serĉado de la vero koncerne la ĉeeston de Maria en Efezo.

(daŭrigota)

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

PREGO AL MARIA

Maria, via mistero estas gracopleneco,
vi, kiu transpaŝas la sojlon de l' Templo
kaj prezentas al la Patro lian amatan Filon, via infano.

Benata Virgulino, ame rigardu tiujn, kiuj dediĉas al Dio sian tutan memon kaj sian tutan vivon.

Manprenu ilin kaj faru el ili anoncantojn de via Filo Jesuo.

Virgulino, por ĉiam oferita al Dio, ni ofaras al vi nian koron: instru al ni pri amo.

Virgulino, humila kaj atenta gardantino de la Vorto, malfermu niajn mensojn por ke ni daŭre sciu akcepti la Veron.

Preĝanta Virgulino, ni preĝas kun vi:

alvenu la regno de Dio, faru el ni atestantojn de l' Sinjoro.

Virgulino, kiu iras laŭ la paŝoj de Jesuo, nia fidinda gvidantino, montru al ni la vojon al la Evangelio.

Virgulino, obeema servantino de l' Sinjoro, ni rediras nian "jes": ĝi estas eta semo, plantu ĝin,

kaj ĝi donu frukton en la Eklezio de Dio.

Maria, ni vin preĝas por ĉiuj kaj por ĉiu:

Daŭre donu al la Eklezio homojn dediĉitajn al Dio kaj al la proksimulo, Helpu tiujn, kiuj bezonas, kiuj estas malriĉaj, malsanaj, kiuj ne plu preĝas al vi.

Protektu la familiojn, la junularon, la maljunularon.

Al ĉiuj, donu Jesuon, via Filo. Amen.

M-ro DIONIGI TETTAMANZI

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

NEKROLOGO

Fine de septembro, P-ro Bourdon perdis sian fraton, Paŭlo, 87-jara.

Krome, ni priploras la forpason de du fidelaj anoj: S-ro LE MARQUAND el Valognes, kaj P-ro Léon GOUDE el Maine-et-Loire. (v. sekvantan paĝon)

Ni tre frate kondolencas al la familianoj kaj preĝas por la ripozo de iliaj karaj animoj.

PASTRO LEON GOUDE

Li forpasis en Angers la 8-an de aŭgusto post longa malsano. Li naskiĝis en 1923, pastrigis en 1947, prizorgis la katolikan junularon en lernejoj ĝis 1966, poste iĝis paroĥestro en diversaj urboj ĉirkaŭ Angers, i. a. en Vieil-Baugé kaj Baugé.

Li eklernis Esperanton en 1958 kaj aktivis en la movado ĝis siaj lastaj tagoj. Li estis membro de I.K.U.E. kaj de ties franca sekcio F.K.E.A., partoprenis en pluraj katolikaj aŭ ekumenaj kongresoj, en vere frateca spirito.

"Karakteriza trajto de la personeco de Leon estis la universala malfermo, kium li havis, ia ĉiutaga ekumenismo, ĉefe per la ligiloj, kiujn li kreis kun homoj el ĉiuj medioj, religioj, opinioj, ligiloj naciaj kaj internaciaj, plej malproksime el niaj landlimoj, en ĉiuj landoj de la mondo, ligiloj, kiujn li teksis de pli-ol 40 jaroj per Esperanto, de kiam M-ro Chappoulie oficiale donis al li mandaton por ĉeesti kaj aktivi en tiu medio, riĉa je divido de la ideoj kaj vivmanieroj de tiuj, kiuj ĝin konsistigas".

(eltiraĵo el la homelio eldirita dum la entombiga diservo)

* * *

OMAGE KAJ DANKEME AL PASTRO GOUDE

Forpasis mia frat' Leono:
Ripozu li ĉe nia Di'.
De li aŭdiĝis 'melodi'
Per dolĉa voĉ' de baritono.

Li kantis Patron kun dispono
Kaj s'ervis fratojn tra radi'.
Forpasis mia frat' Leono:
Ripozu li ĉe nia Di'.

De li elŝprucis ĉiam bono
Laŭ ama ĝoj' sen komedi'
Kaj esperanta kredrapsodi'
Plu daŭros kiel fina dono.
Forpasis mia frat' Leono.

Roger DEGRELLE (23/8/1994)

+++++

REGULARO DE SANKTA BENEDIKTO (Prologo)

Aŭskultu, ho mia filo, la instruojn de la majstro, kaj klinu la orelon de via koro. Vi libere akceptu la admonon de tenerega patro, kaj efike ĝin plenumu, por ke vi revenu per la laboro de la obeemo al tiu, for de kiu vi fremdiĝis pro la manko de obeemo. Nun mia parolo direktiĝas do al vi, kiu jam fermetas viajn proprajn volojn, por batali kun la vera reĝo, la Sinjoro Jesuo-Kristo: ekprenu la potencegajn kaj glorajn armilojn de la obeemo.

Unue, ~~xxxxxx~~ petu de Li per insistega preĝo, ke li elfaru la jam komencitan bonafon; por ke Li, kiu degnis nombri nin inter siaj filoj, neniam malgajiĝos pro niaj malbonaj agoj. Necesas ĉiam obei Lin dank' al Liaj bonafonoj, kiujn Li metis en nin, por ke la incitita Patro ne nur ne senheredigiu siajn filojn, sed ke la timenda Majstro, provokita pro niaj malbonaj agoj, ne fordonu nin al la eterna pumo, kiel pekegantajn servantojn, kiuj ne volas sekvi Lin ĝis la gloro.

Ni fine ekstaru ĉe la admono de la Skriboj, kiujn diras al ni: "Nun estas la horo por leviĝo el dormo". (Rom. 13, 11). Kaj kun niaj okuloj malfermitaj al la dia lumo, la oreloj atentaj, ni aŭdu tion per kio la dia voĉo ĉiutage kriante nin admonas, dirante: "Hodiaŭ, se vi aŭskultas Lian voĉon, ne obstinigu vian koron" (Ps. 96, 8). Kaj ankaŭ: "Kiu havas orelon, tiu aŭskultu, kion la Spirito diras al la eklezioj". (Apok. 2, 7). Kaj kion Li diras? "Venu, infanoj, aŭskultu min; pri temo antaŭ la Eternulo mi vin instruos (Ps. 34, 12). Rapidu, dum vi havas la lumon, por ke la mallumo ne venu sur vin". (Jn 12, 35)

(daŭrigota)

KONGRESA PROGRAMO (daŭrigo)

Lumdon, 22-an de majo

- 9.30: komitatkunveno (por la aliaj, vizito de la porcelanpavilono Haviland aŭ de la muzeo pri porcelano)
- 14.00: aŭtobusa rondveturo ĉirkaŭ Limoges (Oradour/Glane, Mortemart, montoj de Blond k.c.)
- 18.30: diservo
- 21.00: preĝvespero

Mardon, 23-an de majo

- 9.30: diservo
- 10.30: vizito de la abatejo de Solignac je 10 km, se estas sufiĉe da veturiloj
Disiĝo post la tagmanĝo

* Se estas sufiĉe da veturiloj, ebleco, dimanĉon, partopreni la elmontradojn (Ostensions) en St-Léonard. "Ostensions" estas grandaj kaj solenaj religiaj festoj, dum kiuj oni montras ekstere la relikvojn de la Limozaj sanktuloj. Ili okazas ĉiun sepan jaron.

KOTIZTABELO 1995

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 150 F
Peranto: P-ro R. DEGRELLE p.ĉ.k. NANCY 2 555 38 L.

A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo 40 F
geedza paro 50 F
infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o 20 F
bonfaranto 200 F

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" 280 F
U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro 300 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

ENHAVO

- | | |
|--------------------------------|-----------------------------------|
| 1. Le mot du président | 4. La kristana Oriento |
| 2. La bileto de la prezidanto | Preĝo al Maria |
| Legante la dian parolon | 5. Pastro Léon Goudé |
| Kongreso en Armeno | Regularo de S-ta Benedikto |
| 3. Pri la Korano | 6. Kongresa temo |
| Protokolo de la komitatkunveno | Kongreso en Limoges |
| Mortis P-ro Esperanto | 7. Kongresaj programo kaj aliĝilo |

Dépôt légal: 4ème trimestre 1994 !! Polycopié par l' A.C.F.E. (enregistrée le 6 !! mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur sous C.P.P.A.P. n° 62 532. !! le n° 2 523 bis, J.O. 23/05/1977) Directeur: Albert BESSIERE !! au Prieuré St-Martin Directeur-délégué: !! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE René-Jean MARMOU !! FRANCE